# [uea-membroj] EKO 2 Le Puil

1 mensagem

**Stefan MacGill via groups.io** <stefan.macgill=gmail.com@groups.io> 22 de janeiro de 2026 às 05:10

Responder a: uea-membroj@groups.io
Para: listo 'nova uea-membroj' <uea-membroj@groups.io>

Stefan MacGill

Respondecoj en UEA: Landa Agado, AMO, EKO, Canuto.
Respondecoj en ILEI: Loka kaj landa agado, Juna amiko.

---------- Forwarded message ---------
From: **Stefan MacGill** <stefan.macgill@gmail.com>
Date: Thu, Jan 22, 2026 at 9:14 AM
Subject: Fwd: EKO 2 Le Puil
To: Eszperantó oktatók, tanárok listája <ilei-hu@lev-lista.hu>, ilei-sekciestroj-kaj-reprezentantoj <ilei-sekciestroj-kaj-reprezentantoj@googlegroups.com>, Monika Molnar <esperanto_momix@yahoo.it>, ilei-komitatanoj <ilei-komitatanoj@googlegroups.com>, Katalin Kovats <katalin.kovats@gmail.com>, Zsofia Korody <korody@gmail.com>, Małgosia Komarnicka <malgosia.junaamiko@gmail.com>

## EKO 2026-2. Januaro 22

## Franca kuraĝulo forlasis nin

La 5-an de januaro 2026 en la hospitalo de Bourges forpasis **Jacques Le Puil** (1940-2026), franca diversprofesiulo, kantisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Ĵak Le Puil kaj Ĵak Lepŭil'; kantisto kaj muzikisto en ses muzikaj albumoj, kunfondinto kaj senŝanĝa redaktoro de "La KancerKliniko", tradukinto de pluraj libroj. Ni kondolencas lian edzinon Armela kaj lian filinon Cendrina. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2026/01/lepuil-2/

## ILEI raportas

Raportas la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2025-10-15 ĝis 2026-01-15.

Pro la situacio en Irano nia Prezidanto, Ahmad Reza Mamduhi, bedaŭrinde ne havas nun aliron al interreto. La Estraro decidis pretigi la raporton por doni gravajn anoncojn.

***SMG*** persone kaj nome de EKO deziris al Ahmad forton en la nunaj malfacilaj tempoj. Sed eble li ne povis ricevi tiun mesaĝon.

Ŝlosilpunktoj: Forpasoj de Rob Moerbeck kaj Émile Malanda; Propono de Zhang Yan kiel financa kontrolisto; Kongreso kaj Simpozio 2026 ĉe Zaozhuang-a Universitato; Partopreno de ILEI dum VK 2025; Zamenhofa Tago 2025; Interkonsento kun la Universitato de Burundo; novaj Kunpensigadoj pri Esperanto en Universitatoj; la "30 Oraj Horoj" en la Aktoj de la Konferenco EuroCALL 2025; Lerneja agado en Benino; Kurso en la persa por la projekto

EToSo; la Ĝenerala Konferenco de Unesko 2025 en Samarkando; kunlaboro kun UEA, Ĉina Komunikila grupo, FIPLV.

## Ondoj da *ondo* pri la mondo

Dum 2200 sinsekvaj tagoj, ekde la 1a de januaro 2020 ĝis nun, en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. Nun en la retejo estas 4255 tekstoj, kiujn garnas 5512 ilustraĵoj. Legu pli pri la retejo kaj vidu la liston de la plej legataj tekstoj ĉe https://sezonoj.ru/2026/01/ondo-153/

Ĝis nun **neniu** esperantista asocio, instanco aŭ fondaĵo subtenis la solan ĉiutage renovigatan Esperantan novaĵretejon. Ĝia funkciado dependas nur de la helpemo de tiuj, kiuj abonas la ĉiusezonan gazeton *La Ondo de Esperanto*. Se vi ne abonas ĝin, sed deziras helpi la novaĵretejon, abonu ĝin aŭ abonigu via(j)n amiko(j)n por 2026.

## Senlimaj scioj

La Asocio Scio sen Bariloj festas sian 35-an agadon. Fondita en 2009 ĝi Subtenas la aliron al scioj, kiam financado mankas por lerniloj, aliro al kursoj kaj komputiloj.. Pri SSB legu en Vikipedio.

Mirejo Grosjean

## Litova jubileo

Meze de decembro 2025 en Kaŭno (Litovio) okazis la 60-a jubilea Kongreso de Litova Esperanto-Asocio kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj kun ĉirkaŭ 80 partoprenantoj. Legu pli en ampleksa ilustrita artikolo de Povilas Jegorovas en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2025/12/litovio-84/

## Emile Malanda en memoro

x

Unu el la longdaŭraj afrikaj aktivuloj kaj eks-kunordigantoj de la Afrika Komisiono de UEA, li forpasis en Matadio, 250 km de ties naskiĝurbo Mbanza Ngungu (DR Kongo).
Biografieto pri la forpasinto ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Emile_Malanda

Adje Adjévi

## Kanada Lumo

Jen la plej nova numero de "Lumo", kaj la lasta sub mia redaktado (la torĉon transprenos nia kara amiko kaj samurbano, Garry Evans, konata kiel "s-ro Mann" de la teatraĵo "1910"). Tiu ĉi numero estas aparte bunta! Atendas vin profunda esploro de la temo *Esperanto kaj kinoarto*. Mi dediĉis ĝin al tiu temo pro la apero de nova kanada profesia filmo en Esperanto, "Himalia" -- projekto, en kiu partoprenis multaj anoj de Esperanto-Societo Kebekia kaj kies rezulto estas absolute brila (eŭropanoj, atentu! Vi povas spekti ekde la 7-a de januaro rete en la kanalo Arte.tv - diskonigu)! Vi legos plurajn artikolojn pri la granda evento de la jaro -- la Dulanda Kongreso. Kiel ĉiam atendas vin pluraj aliaj artikoloj kaj literaturaj kontribuoj.
https://esperanto.ca/lumo/

Ĵenja Amis, la redaktoro

## Scienca kalendaro denove

Kelkaj el vi spertis malfacilaĵojn por elŝuti la Sciencan Lernejan Kalendaron de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC)

Ili daŭre havas problemojn en la t.n. Digital-CSIC, do la oficiala loko (https://digital.csic.es/handle/102, 1/411155), kaj tial ili prokrastis la oficialan anoncon.

Fine, ili jam anoncis la kalendaron oficiale:

https://www.csic.es/es/actualidad-del-csic/ya-se-puede-descargar-el-calendario-cientifico-escolar-2026

Kaj publikigis ligilon al alternativa elŝutejo, ĉe: https://eventociencia.es/calendario-cientifico-escolar/

## Zumu inter kongresoj

Partoprenu en zoom-evento de Itala Esperanto-Federacio!

Dum la renkontiĝo **"ONI KONGRESAS"**, la organizantoj prezentos la detalojn, programojn kaj novaĵojn de la sekvaj aranĝoj:

- Itala Kongreso de Esperanto
- ILEI-Kongreso en Zhiaozhong, Ĉinio
- UK en Graz, Aŭstrio
- IJK en Katalunio
- IJF en Italio aprile

**Kiam?** La 27-an de januaro 2026  Je la 20:00 UTC (kontrolu vian lokan horzonon!)

## Eŭropaj monbiletoj – De Betoveno ĝis birdoj

Ĉu vi scias, ke en 2027 eble aperos tute novaj monbiletoj en Eŭropo? Kaj ke ili eble montros ne plu pontojn aŭ vitralojn, sed famajn personojn **aŭ eĉ birdojn**?
Ĉu vi preferus vidi **Betovenon** aŭ **blankan cikonion** sur via monbileto?
La artikolo klarigas, kial la eŭrobiletoj ĝis nun aspektis tiel neŭtralaj kaj arkitekturaj, kaj kiel la Eŭropa Centra Banko nun petas la opiniojn de civitanoj pri pli senteblaj kaj kulturriĉaj bildoj.
Temas pri vere aktuala kaj atentokapta debato!
**Verkita de:** Laurent Ramette; **Voĉlegita de:** Patrick Morando.
Vi povas **legi** kaj aŭdi la artikolon ĉi tie:
**https://uea.facila.org/artikoloj/legaĵoj/ĉu-birdaj-monbiletoj-en-eŭropo-r492/**

## EUROCALL 2026: 8 – 11 Septembro, Belfast

**Promoting linguistic diversity through CALL**

La Universitato de Ulster ĝojas gastigi la konferencon EUROCALL 2026 en Belfast, Norda Irlando

Stefan MacGill

Respondecoj en UEA: Landa Agado, AMO, EKO, Canuto.
Respondecoj en ILEI: Loka kaj landa agado, Juna amiko.

_._,_._,_

---

Groups.io Links:

You receive all messages sent to this group.

View/Reply Online (#6830) | Reply to Group | Reply to Sender | Mute This Topic | New Topic

La konversacioj en ĉi tiu listo estas privataj por la komunumo. Bonvolu ne afiŝi retpoŝtojn en vian blogon aŭ plusendi ilin, krom se vi certas, ke ĝi estas en ordo ĉe la verkisto.

: uea-membroj+unsubscribe@groups.io

Your Subscription | Contact Group Owner | Unsubscribe [paulo.pires@flugfolio.xyz]

_._,_._,_